n-ro 55

januaro 1997

## Novjara saluto de la prezidanto

Estimataj gekolegoj, karaj IKEF-anoj,

Rapide pasis la 12 monatoj de 1996. Al IKEF aldoniĝis plia sufiĉe sukcesa jaro. Menciindaj eventoj en 1996 estis diversaj kunvenoj - mi memorigas al Praha, Shanghai kaj Ferrara -, la eldono de la Sindikata Terminaro kaj fine de la jaro la ekapero de IKEF en interreto pere de Bent Holm.

Mi varme invitas vin, ke vi ankaŭ en 1997 per diligenteco, konvinkoforto kaj eĉ entuziasmo agadu por la ĝenerala celo de IKEF, nome akceptigi kaj plivastigi Esperanton en komerco kaj ekonomio per praktika uzo de la lingvo.

Al vi kaj viaj familianoj mi deziras prosperan jaron 1997.

Franz Josef BRAUN

## Enhavo


Anoncitaj aranĝoj . . . 3
Novaj membroj . . . 5
Komerca Ĉambro de Ĉeĥa Respubliko: korekto . . . 5
Recenzo . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . 7
Antaŭiranto de IKEF . . . 8



**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas dujara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)knooppunt.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank

Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



**Anoncitaj aranĝoj**

**Italio**, Coldi Nava (Imperia, Liguria), 26 marto - 1 aprilo 1997, 21a internacia junulara kongreso, temo: 'Estonteco'. Informoj: Frederico Schreiber, via dei Cardaroli 7, I-34135 Trieste; fakso +39-40-763128, rete fulmo(a)flashnet.it.

**Esperantologia konferenco - 17-18 aprilo 1997 - Budapest**

En la Universitato ELTE de Budapeŝto la Esperanto-Fako festos sian 30-jaran ekziston en 1997. En ELTE oni povas diplomiĝi pri esperantologio, E-kulturo kaj literaturo.

Por festi la datrevenon la universitato aranĝos sciencan konferencon pri esperantologio. Oni povas prezenti kaj aŭskulti prelegojn kaj studojn en subsekcioj pri
- E-kulturo
- Instruado de Esperanto
- E-lingvo kaj literaturo
- Movadhistorio.

Partopreno en la konferenco kaj por aŭskultantoj kaj por prelegantoj estas SENPAGA. Se vi estas kompetenta en iu el la sekciaj temoj, ankaŭ via kontribuo estas atendata. Resumon de via prelego kun viaj personaj datumoj sendu ĝis 31-a de januaro al: Universitato ELTE, Esperanto-Fako, Piarista köz 1, HU-1052 Budapest, Hungario, fakso (36)-1-266-5699.

Ĉambroj en la hotelnivela gastejo de la universitato kostas 40 DEM por unu tago. Hotel Peregrinus, Sverb u. 3, H-1053 Budapest V, tel. (36)-1-266-4911/13.

**Rusio**, Vladivostoko, 22-26 aprilo 1997, 2-a Internacia Studenta Scienc-Teknika Kongreso de Azi-Pacifikaj Landoj. Laborlingvoj: angla, esperanto, rusa. Aliĝkotizo: 100 USD (inkluzivas transporton de/al flughaveno). Kontakt-adreso: Aleksandr Titajev, FESTU, 10 Pushkinskaja str., 690600 Vladivostok, Rusio; tel.:(4232)268769, fakso:(4232)266988, retpoŝto: espero(a)pub.marine.su aŭ root(a)dpicnit.marine.su. En la 1a kongreso (oktobro 1995) partoprenis pli ol 700 studentoj el Japanio, Tajvano, Usonio, Rusio kaj Alĝerio. Vladivostok estas bone atingebla aviadile el multaj grandaj urboj.

**Germanio**, Aalen/Stuttgart, 10-19 majo 1997: Eŭropa Esperanta Kultura Semajno. Verŝajne okazos IKEF-kunveno je 17 aŭ 18 majo. Detaloj aperos en venonta La Merkato.

**Belgio**, Antwerpen, 30 majo - 1 junio 1997: Kultura semajnfino pri komunikado. Vidu LM54. Informoj: FEL, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen; rete: fel(a)knooppunt be.

**Hungario**, Budapeŝto, 31 julio - 6 aŭgusto 1997, 2a Eŭropa Esperanto-Festivalo. Programeroj i.a.: konferenco pri komunikado en internaciaj organizoj kaj seminario pri kunlaboro de landaj asocioj aliĝontaj al Eŭropa Unio. Informoj: Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, H-1368 BUDAPEST; rete: esperantohes(a)mail.c3.hu.

**La kasisto dankas pro frua pago de via kotizo por 1997 !**

## Ekonomia Bulteno pri Usono

Pro personaj cirkonstancaj d-ro Thomas A. Goldman ne povas daŭrigi la eldonadon de la Ekonomia Bulteno pri Usono. Li jes daŭrigos sian agadon rilate al Esperanto kaj ekonomio, sed sur malpli intensa bazo.

## IKEF en Interreto !

Dank' al nia nova membro Bent Holm, ankaŭ IKEF nun ĉeestas en interreto (Internet). Konsultu la IKEF-paĝojn je adreso:
http://www2.dk-online.dk/users/TeamHolm/ikef.htm.
Pli detalaj informoj aperos en la venonta numero.

## Komerco- kaj industrioĉambro de Colmar (Francio)

tra interreto aperigas liston de neokupitaj profesiaj ejoj en sia regiono. Konsultu: http://www.rmcnet.fr/cci.

## Agado de komercoĉambroj en Francio

Tripaĝa artikolo pri tiu temo, verkita de IKEF-estrarano F.X. Gilbert, aperis en numero 13 (januaro 1997) de la revuo TAKE-LA DOMO.



## Esperanto-kalendaro

La hungara revuo Eventoj prizorgas kompletan kalendaron de Esperanto-aranĝoj. Organizantoj nepre sendu informojn al Eventoj ! La listo estas konsultebla rete je:
www.hungary.net/esperanto/.
Kiu nur havas aliron al elektronika poŝto sendu mesaĝon al:
<w3mail(a)gmd.de> kun la enhavo
'get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt'.
La listo estos sendata aŭtomate.

**ESPERANTA JURA ASOCIO (EJA)**

Kotizo: 15 NLG por iama socialismaj landoj de orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko - 30 NLG por aliaj landoj. UEA-konto ejax-r.

Aliĝanto samtempe kun la pago havigu informojn (nomon, adreson, profesion kaj jurajn diplomojn) al la sekretario: s-ro André RUYSSCHAERT, 4 rue Théodore Eberhard, L-1452 LUXEMBOURG.

## Novaj membroj

230. S-ro Bent Holm, Haslevangsvej 30, DK-8210 ÅRHUS 5 (retadreso: teamholm(a)dk-online.dk)
231. S-ro SHEN Jianrong, Dom men te tou Xin Cun 4 zuo 604 Hao, CN-350011 FUZHOU, FUJIAN
232. S-ro Roberto BIANCHI, Fernando de Rosa 5, I-40134 BOLOGNA, Italio
233. S-ro Kep. ENDERBY, 2 Phoebe Street, Balmain NSW 2041, Aŭstralio
234. S-ro Fernando J. G. MARINHO, Roa Bernardo Coutinho 2653, Araras, BR-25725-020 PETROPOLIS, RJ, Brazilo
235. D-ro Rainer KURZ, Plettenburgstr. 19, D-70186 STUTTGART, Germanio

## Nova retadreso

Nova retadreso de Yamasaki Seiko: syama(a)dokkyo.ac.jp

## Nova adreso

5. S-ro Per HAGEMANN, Korsebøllevaj 16, Korsebølle, DK-5953 TRANEKÅR, telefono +45 62 59 13 22, reto perhag(a)post3.tele.dk

181. S-ro Zandandu Ntomono ZOLA: B.P. 1821, Kinshasa 1

Distribuantoj en la tuta mondo serĉataj por CD-ROM-oj

Altkvalita vara (jam milionfoje vendita en Germanio): CD-ROM-oj (kompaktdiskoj por komputilo). Enhavo: softvaro-ludoj-lernadiloj. Uzataj lingvoj: angla kaj germana. Prezo por vendejoj: ĉ. 10 USD.

Se vi estas profesia distribuanto aŭ bona vendisto kaj kapablas vendi ĝin multfoje al vendejoj en via lando, bonvolu kontaktu: Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19, D-70186 STUTTGART, Germanio; tel.: +49-172-971.56.37; fakso +49-7181-22.333.

**Komerca Ĉambro de Ĉeĥa Respubliko: korekto**

En LM54 aperis raporto de la IKEF-kontaktkunveno okaze de la UK. Nia ĉeĥa membro Vladislav HASALA (firmao La Espero) atentigis nin pri eraro en tiu raporto. La membrokotizo estas 500 (kaj ne 50) kronojn jare. Juraj personoj (t.e. la pligrandaj firmaoj) pagas 5000 kronojn + 50 kronojn por ĉiu dungito.

FXG/RR

S-ro Vladislav HASALA, A. Dvoráka 1, CZ-696 62 STRAZNICE, Ĉeĥio, ofertas:
* peradon kaj abonon de esperantaj revuoj,
* esperantajn filatelaĵojn el ceĥio.
Petu informilon !

**Recenzo pri la projekto "Tweeluik - Nieuwe Markten voor het MKB"**

**Studaĵo pri la taŭgeco de novaj merkatoj ekster okcidenta Eŭropo por etaj kaj mezgrandaj entreprenoj (EME)**

Ĉi tiu studaĵo estas farita de s-ro Maurice RUHL, studento en la Katolika Universitato Nijmegen, laŭ komisio de la Centra Gelderlanda Ĉambro pri Komerco kaj Industrio en Nijmegen. La broŝurita, nederlandlingva, 136paĝa libro anekse enhavas resumon en la lingvoj nederlanda, germana, angla kaj Esperanto, kiun prizorgis nia membro Inĝ. Kees RUIG (IKEF 68), konsilisto de tiu Ĉambro kaj iniciatoro por tiu projekto.



La celo de la studaĵo estis la esploro pri ŝancoj al direkta eksporto ekster okcidenta Eŭropo por nederlandaj EME-oj. EME estas difinita kiel entrepreno kun malpli ol 100 dungitoj. Ĝis nun tiaj entreprenoj tradicie eksportas precipe al la najbaraj landoj Belgio kaj Germanio. Pro la estonta tutmondiĝo de la komerco ŝajnas ankaŭ por ili necese eksporti en pli forajn mondregionojn. Sed, ĉar la homfortoj de EME-oj estas limigitaj, ili devas sian koncentri al promesplenaj novaj eksportmerkatoj.

Kiel nunaj specifaj ĉefproblemoj de nederlandaj EME-oj evidentiĝis

(1) la mankanta mastrumadotempo por eksporto,
(2) la pagrisko/nesolventeco de eksterlanda aĉetanto,
(3) la trovo de taŭga kaj fidinda agento aŭ reprezentanto,
(4) administraj problemoj pri dogana aranĝado,
(5) la altaj laborkostoj en Nederlando kombinitaj kun la stabila kurzo de la guldeno.

Por eltrovi merkatojn kun bonaj kondiĉoj, oni uzis kvin ĉefajn kriteriojn, laŭ kiuj oni prijuĝis ĉiun landon per cifera sistemo:

1. politika situacio de la lando: ŝtata formo, internaj etnaj streĉitecoj, eksterlandaj rilatoj;

2. interna ekonomia situacio: ekonomia kresko, inflacio, interezoj; investado, senlaboreco, kvoto en la monda komerco;

3. ekstera ekonomia situacio: aĉetpovo, saldo de la pagobilanco, eksterlanda ŝuldo, konvertebleco de la nacia valuto;

4. komercaj kondiĉoj: influo de publikaj kaj merkataj instancoj kiel grado de burokratio, impostado, leĝdonado; plie ĉeesto de internaciaj bankoj, telekomunikado, infrastrukturo;

5. komerca etiko: fidindeco de eksterlanda aĉetanto, pagrisko, komerca kulturo, fremda lingvo.

Por ricevi la necesajn informojn pri la esplorotaj landoj, oni uzis diversajn fontojn, ekzemple la nederlandajn komercajn ĉambrojn kaj ambasadojn, la nederlandan ministerion pri ekonomiaj aferoj, la nederlandan kompanion pri kreditasekuro, grandajn bankojn.

Entute estis esplorataj 43 landoj ekster okcidenta Eŭropo. Ĉi tiuj landoj troviĝas en 9 landogrupoj: meza kaj orienta Eŭropo (ekssocialismaj landoj), Baltiko, Mediteraneo, meza Oriento, orienta Azio, Oceanio, Sud-Afriko, norda Ameriko, suda Ameriko.

Oni krude dividis la EME-ojn laŭ la tipo de entreprenisto en (1)

aventuremajn kaj (2) singardajn. La unua tipo ne timas aktivaĵojn ekster Eŭropo, dum la dua tipo preferas sin limigi al pli apudaj eŭropaj regionoj.

**Rezultoj kaj konkludoj**

La kvin ĉefaj problemoj ekzistas pli-malpli en ĉiuj priju ĝitaj ŝtatoj. Ŝajnas, ke la fremdlingva problemo kaj la deviaj kondutmanieroj (alia afereca kulturo) ofte estas subtaksataj de nederlandaj EME-oj. Tamen, laŭ prijuĝo kaj taksado de la kriterioj en la 43 landoj montriĝis jena bildo:

Por ambaŭ tipoj de entreprenistoj surprize montriĝis la sama venkinto: **Nov-Zelando**. Kvankam ĝi situas ekster Eŭropo, kvar el la kvin ĉefproblemoj ne aŭ apenaŭ validas: burokratio, pagrisko, nestabila valuto, reprezentanto aŭ agento ne necesas. Aldonaj avantaĝoj estas la bona ekonomia perspektivo, alta aĉetpovo, la angla kiel komerca lingvo. Ĉio ĉi estas pozitiva por la singarda entreprenisto; por la aventurema entreprenisto ekzistas aldonaj eblecoj por eksporto al la apudaj Aŭstralio kaj aziaj landoj.

Por la aventuremuloj plie rekomendiĝas ses interesaj novaj eksportmerkatoj: Singapuro (precipe pro ĝia severa kontraŭkorupta politiko kaj alta aĉetpovo), Tajvano, Malajzio, Ĉilio, Argentino kaj la Unuiĝintaj Arabaj Emiratoj. Por la singarda eksportisto estas rekomendindaj Ĉeĥio, Slovenio, Malto, Cipro kaj Israelo.

Do, vi, entreprenistoj de EME-oj en Nederlando - kaj certe ankaŭ tiuj en Belgio, Danio kaj Irlando - scias nun, kien plifortigi viajn klopodojn por eksportado. Sed la aŭtoro iom limigas siajn responsecon, dirante ke la projekto "Tweeluik" ("diptiko", pentraĵo el du pecoj) estas nur unua superrigardo pri eblaj novaj eksportmerkatoj, do kvazaŭ pilota studaĵo. La individua entreprenisto estas la piloto, kiu mem destinu sian flugcelon.

FJB

**<u>Komercaj petoj kaj proponoj</u>**

**Albanio**

Firmao Karajani Shpk, Rr. Abdi Toptani 2, Tirane, Albanio, telefakso +355 42 23972, akceptas ofertojn je grundo kaj domo ne tro granda (3-4 ĉambroj) en iu el jenaj landoj: Grekio, Italio, Germanio, Usono, Kanadio, Aŭstralio kaj Hispanio. La firmao Karajani pretas investi siajn kapitalojn en supre menciitaj landoj. Bv. alsendi la prezojn.

**Ĉinio**

Vestaĵoj, babuŝoj, ĉapeloj, tefolioj, elektronikaĵoj, skribilaro ktp. Ekz.:
- Frapilo por elektrokuti insektojn (grava novaĵo, akirinta du orajn medalojn): po 5 USD CIF;
- strandbabuŝo (EVA miksita PE) 0.8 USD/paro; (PVC) 0.5 USD/paro FOB.
S-ro SHEN Jianrong, Dom men te tou Xin Cun 4 zuo 604 Hao, CN-350011 FUZHOU, FUJIAN; tel. +86 591 7533701, fakso +86 591 7547505.

**<u>Antaŭiranto de IKEF</u>**

La artikolo pri la Komercista Esperanto-Unio kaj ties revuo "La Komerco" fare de Roland Rotsaert en La Merkato 53 (julio 1996) estis interesa. Surpriza estas la informo ke la siatempa eldonkvanto estis 13 000! Ĝi diras ke la revuo ne plu aperis post 1996, sed ĉu la jaro ne estas eraro por 1936?

Dume, mi havas fotokopiaĵon de kolekto da "Internacia Komerca Revuo", ekde la unua numero, eldonita en septembro 1919, ĝis numero 26 de aŭgusto 1922 (378 A5-paĝoj). Ŝajnas ke ĝi ne estas organo de iu organizo kiel la nia, sed subtitolas sin simple "centra organo por komerco, industrio kaj tekniko", publikigata en Zuriko (Stampfenbachstr. 69) ĉe la eldonejo Furrer & Co. La redaktanto estis certa D-ro Hj. Unger de Zuriko. Ĝi fieras, en la trilingva postkovrila Avizo, esti "die einzige Handels-Zeitschrift, die in mehr als 65 Ländern der Erde gelesen wird, wo etwa 40 verschiedene Nationalsprachen gesprochen werden!" ("La nura komerco-revuo, legata en pli ol 65 landoj de la mondo, en kiuj estas ĉ. 40 naciaj lingvoj.") La jara abono kostis CHF 5,00. "La Komerco" havis fakte siaflanke antaŭanton en tiu ĉi periodaĵo. Mi eĉ ne scias ĉu ĝi post aŭgusto 1922 estis daŭre eldonata, sed almenaŭ la ekzempleroj kiun mi havas estas sinsekvaj.

Mi aĉetis ĝin, laŭ mia memoro, informite pri ĝi de IKEFano YAMAKAWA Shuichi, kiu trovis anonceton en iu esperanto-periodaĵo. La stato de konservado ne estas malbona, sed el la naturo de fotokopiado estas en iuj partoj iom neklara, do kopioj el mia kopiaĵo povas esti en iuj partoj (sed ne multaj) malfacile legeblaj. Sub tiu rezervado, mi volonte faros kopion kaj sendos ĝin se iu volas da havi unu. La plej dezirinde estus eltrovi tiun kiu havas la originalon kaj havigi tiun ĉi al eventuala IKEF-biblioteko ĉe s-ro Rotsaert.

YAMASAKI Seiko (nova retadreso: syama(a)dokkyo.ac.jp)

P.S. de Roland ROTSAERT:

"1996" efektive estas eraro; devas esti "1936". Ankaŭ mi havas fotokopiojn (foje malbonajn) de la "Internacia Komerca Revuo", kun sama paĝo-nombro. Do ŝajne ne aperis pli da numeroj. Antaŭ pli ol 5 jaroj iu atentigis min pri tiu revuo kaj mi kopiis la kolekton (laŭ mia memoro orginalan) de Fondaĵo Vanbiervliet en Kortrijk. La revuo ankaŭ troveblas en IEM de Vieno kaj en Hispana Esperanto-Muzeo. Siatempe mi iom esploris, sed ne sukcesis trovi pliajn informojn pri la eldonanto aŭ pri la kaŭzo de la malapero.